

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

L. L. Zamenhof 100-jara

Sibayama Zyun'iti

La 14-an de aprilo 1917, forlasis la mondon Lazaro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Pasis 100 jaroj de tiam. Ni en nia rondo, en la 15a de apr. havos Hama-Rondan Vesperon omaĝe al li.

Nu, iom da historiaj aferoj. Tiu jaro estis 30 jarojn post la publikigo de Esperanto. En Japanio, tiu jaro estis 11 jarojn post la organizado de Japana Esperantista Asoco (JEA). Al tiamaj esperantistoj, tamen la novaĵo pri la forpaso de Zamenhof estis per artikolo de ĵurnalo datita la 23an de aprilo, per citaĵo el telegrama novaĵo. Tial oni dubis pri la vereco de la informo. Sciinte tamen tion vera, tiama organo "Japana Esperantisto" omaĝis lin jene;

"Estas ja korŝiriga fakto, ke apostolo de amo kaj paco ekdormis sian eternan dormon en la tempo, kiam la homaro, atakita de homara freneziĝo, buĉadas sin reciproke; en la loko kie oni aŭdadas ĉiutage tondrojn de pereigantaj kanonoj."



tombo de L. L. Zamenhof en Varsovio, starigita en 1921
(foto de Cezary Piwowarski: GNU-licencita)

Antaŭ 2 jaroj, UNESKO publikigis kelkdek aferojn, kiuj estu mondoskale celebrataj en la jaroj 2016 kaj 2017, kaj la centjariĝo de la forpaso de Zamenhof estas unu el tiaj eventoj. Ĉar UNESKO estas inter-ŝtata organizo, tiun decidon apogis Pollando. La Pola Kultura Centro sub la pola ambasadorejo en Japanio apogas eventojn rilate al Zamenhof, kaj sendos sian membron (japanon) al nia Hama-Ronda Vespero por komuniki, kion poloj aŭ pola registaro pensas pri li, do ni atendas lian klarigon, farotan el ne-esperantista vidpunkto.

★★★★★

Niaj Planoj

*maj. 13 - maj. 14

[Esperanto-Domo de Jacugatake]

Kunloĝado de la membroj en la staĝejo de JEI en Jacugatake, 200 km for de nia urbo. Post vespermanĝo ni planas havi tempon paroli en Esperanto.

*maj. 13- julio 15 [Kanagawa Kenmin Sentaa]

Rudimenta kurso de Esperanto, por 10 fojoj.
Gvidos Fuse Kentarou.

*jun. 3 [Kanagawa Kenmin Sentaa] Legokunsido

Leginte jenan libron, oni venu por priparoli la verkon: "Serpento en la puto", originala romano de István Nemere, kies temo estas islamisma terorismo.

106a Legokunsido

En la 4a de marto, ni havis la 106an Legokunsidon por **"Hodler en Mostar"**, originala novelo de Spomenka Štimec. Partoprenis kvin personoj.

Intermikso de Epizodoj

—impreso pri "Hodler en Mostar" verkita de
Spomenka Štimec—

AIDA Yayoi

Ĉu tiu ĉi verko estis kolekto el jam publikigita eseero en iuj gazetoj aŭ revuoj kaj poste reviziita en la formo de libro? Tio estis mia unua intereso pri la libro, ĉar inter ĉapitroj mi ne povis trovi koheran rilaton disvolvi anekdotojn pri Hodler kaj antaŭenigi la legadon kun atendo. Ŝajnis al mi, ke tiu ĉi malgranda, nur 104-paĝa-libro estas priskribita du-maniere; unu estas klarigi okazaĵojn laŭ tempofluo, kaj la alia estas elekti plej taŭgajn notojn kaj meti ilin inter taŭgajn lokojn. Pro tio estis iom malfacile kapti la enhavon kiel tutaĵon. Mi rezignacie preterlasis kelkajn partojn.

Malgraŭ mia malkontento pri tia indulgema, malsevera strukturo de la verko, la karakteriza simbola frazfarado de Spomenka Štimec ĉarmis kaj ĝojigis min. Ekzemple mi legis la "Postparolo"-n emociite. Neniu povus skribi postparolon tiel sperte. Ĝi ja estis kvazaŭ poemo. Verdire mi tediĝis en la unuafoja lego, sed kiam mi venis al la lasta "Postparolo" neatendite surprizis min la talentoplena esprimo de s-ino Štimec. Kiu alia persono povus skribi kernon de la situacio tiel vivece kaj simbole per tiel malmultaj vortoj kaj frazoj? La postparolo kortuŝis min tiel profunde, ke mi ree eklegis la verkon de la komenco.

Mi laŭdis la "Postparolo"-n, sed miaopinie, la unua ĉapitro ankaŭ estas laŭdinda. Kiel komenci estas ĉiama malfacilaĵo por verkisto, sed s-ino Štimec sukcesis enkonduki ĉefrolulojn Hodler kaj Jeanne kaj plue aliajn gravajn homojn tre efike en la malvastan spacon kun aldonaĵo de tiam historia internacia kaj pentra societo. Pro mia malmulta scio pri Hodler, mi devis dependi de Google por vidi liajn pentraĵojn kaj legi klarigojn pri lia vivo. Ĉarmis min la koloroj de lia pejzaĝo kaj la anekdoto pri "la Nokto".

Kvankam Ferdinand Hodler aperas nur sporade


tra la verko, lia konturo kiel pentristo klare leviĝis antaŭ miaj okuloj. Mi sentis favoron al li. Aliflanke lia privata vivo ne sufiĉe priskribiĝis eĉ en la rilato kun lia filo Hector Hodler. Tio estas tre bedaŭrinda afero.

"Hodler en Mostar"

densa enhavo en dinamika historia fono

Mizro Iwaya

Ferdinand Hodler estas populara pentristo en Svislando. Lia verko estas konkreta, lia konturo de la objektoj estas reala, sed la koloroj kaj konstruoj estas unikaj. Li verkis multon. Ekzemple la bildo de falĉisto, kiun adoptis Svisa Banko por sia monbileto, estas unu el la 20 similaj pentraĵoj. Ankaŭ la portreto de junulino Jeanne sur la dorsoflanko de svisa monbileto estis unu el multaj similaj bildoj.



La modelino Jeanne servis kiel pozisto antaŭ Ferdinand por jaroj. Ŝi edziniĝis al alia sinjoro sed ankoraŭ laboris ĉe Ferdinand. Post lia morto ŝi prenis multe da restantaj verkoj liaj. Tiu ĉi libro rakontas ŝian vivon dum kaj post Ferdinand Hodler.

Samtempe estas rimarkinde ke la aŭtoro ofte montras la historian okazaĵon de mez- kaj orient-eŭropa regiono. Tial tiu ĉi libro estas samtempe bona gvidilo de la regiona historio.

Jeanne estis vaste amata de tri viroj: Ferdinand Hodler, direktoro Andreo Cerani kaj diplomato Meho Ĉiŝiĉ. Ili estis laŭprofesie riĉaj kaj migremaj. Rezulte ankaŭ ŝi migris tra la mondo kaj spertis varian aktivecon. Do oni povas diri ke ŝia vivo estis sufiĉe drameca kaj feliĉa. Sed restis unu manko, t.e. paco. La regiono, en kiu ŝi migradis, estis plena de

militoj. Tia sorto estas ĝuste la duplikato de la aŭtoro. Ŝi mortis en 1955 je la aĝo de 81.

Mi rimarkas ke la libro havas densan enhavon. Aperas multaj personoj famaj kaj nefamaj. Ankaŭ lokoj kaj okazaĵoj estas variaj. Oni kutime konsumos 200 paĝojn kun tia enhavo. Sed fakte la libro havas nur 105 paĝojn. Kaj plue, kial “Hodler en Mostar”? Hodler ne loĝis en Mostar. Fine de la verko klariĝis ke lia portreto (sur la kovrilpaĝo), restis en Mostar kaj poste perdiĝis por eterne. Do lia lasta esto estis en Mostar!

Laste mi aldonas ke Ferdinand Hodler estas patro de Hector Hodler, fondinto de UEA.

Kio okazis en Mostar, urbo en Hercegovino?

Sibayama Zyun’iti

Antaŭ ol eklegi, mi sciis ke Ferdinand Hodler estas fama svisa pentristo – ja mi vidis ekspozicion de liaj pentraĵoj en japana muzeo – kaj patro de Hector Hodler, fondinto de UEA. Je la eklego, mi antaŭsupozis, ke tiu pentristo iam vizitis la hercegovinan urbon, kaj tie pentrisian portreton – eĉ leginte la 3an ĉapitron kun la titolo “Mostar 1901”. Sed tiel tute ne estis. La pentristo neniam vizitis la urbon, kredeble neniam supozis eĉ pri tiu urbo. Do kio okazis? Unu el la modelinoj de lia pentraĵo karmemore posedis lian memportreton, kaj ŝi vendis aŭ perdis multe el liaj verkoj lasitaj al ŝi post lia morto, sed ĉiam tenis tiun portreton – ja tiun videblan en la kovrilo de la libro. Ŝi, kun sia amata edzo migras de lando al lando, fine setlis en Mostar, hejmurbo de sia edzo. Do la bildo certe iam estis en Mostar, sed en la fronta paĝo de la libro estis notite, ke la bildo malaperis – estis ŝtelita – de tiea Arta Galerio. Unu el la motivoj de Spomenka Ŝtimec, kroata aŭtorino de tiu ĉi libro, ŝajnas esti memorigi pri tiu ĉi perdita portreto.

Epizode, tiu ĉi urbo Mostar lastatempe estis aŭdita el amaskomunikiloj, kiel urbo de la “Unuigita Monda Kolegio”, lernejo kapabla doni bakalaŭran diplomon. Tie lernis nordkorea junulo Kim Han-sol (nask. 1995) --- filo de la mortigita Kim Ĝong-nam, pliaĝa frato de Kim Ĝon-un, kuranta estro de Norda Koreio. Tiu lernejo sidas en la 3a etaĝo de la Gimnazio

Mostar-a, jam ekzistinta en la tempo de tiu ĉi novelo.

Nu, la novelo havas plurajn fokusojn, sed lumo refraktanta estas la vivo de Jeanne, iama modelino sed ne plu modelas. Ŝi iĝis flegistino, tie renkontis estontan edzon, kaj sekvis vivon de la edzo, refrakte el urbo al urbo, lando al lando. Ŝi estis pli juna je generacio de la pentristo Hodler; ŝi spertis la unuan mondomiliton en ne militanta Svisio kiel flegistino, kaj spertis la duan mondomiliton en Mostar. Tiu Mostar, post ŝia morto en 1964, spertis la militon jugoslavian. Tiel, Mostar estas la fokuso alia, kiun ligas, mi diru, ne Hodler mem, sed la memportreto de Hodler.

Kial Hodler en Mostar?

Tanigawa Hiroshi

Ferdinand Hodler (1853~1918) estis granda svisa pentristo same elstara kiel Klimt inter la Jarcentfinaj (la 19-a) Artistoj en Eŭropo. Plejparto de liaj verkoj nun estas posedataj de svisaj muzeoj. Sed sufiĉe multaj Hodler-verkoj estas en Bosnio-Hercegovino; plejmulto en Sarajevo, unu memportreto en Mostar. Kial, kaj kiel, tio okazis? Kaj cetere, Ferdinand estis la patro de Hector Hodler, kunfondinto de UEA kune kun Edmond Privat. Kia estis la interrilato de la patro-filo de Hodler? Tio interesis min.

Spomenka Ŝtimec klarigas la aferon per stilo libera, foje malfacile komprenebla al mi. Ĉiuokaze mi ĝuis rakonton de Hodler. i.a. rakonton de Jeanne, amatino, modelino plej amata de Hodler, decide kontribuanta al la restigo de la verkoj de Hodler en Mostar kaj en Sarajevo.

Antaŭe mi aprezis dufoje la bildon “Arbohakisto” de Hodler. Kun gamboj larĝe streĉitaj, kun hakilo alten levita kaj ambaŭmane tenita. Ĝi forte impresis min. Lastatempe mi aŭdis, ke Hodler restigis ĉirkaŭ 20 bildojn de “Arbohakisto”. Samtitolan bildon mi aprezis triafoje en 2014 okaze la grandskala Ekspozicio de Hodler ĉe Nacia Moderna Eŭropa Belartmuzeo, Tokio.

En “Hodler en Mostar” aperas virinoj grave koncernataj al Hodler.

Aŭgustine; naskinta Hector, deĝinta de Hodler kiam Hector estis bebo. Hector vivis

kune kun ŝi. Sed interrilato inter la patro-filo ŝajnis firma. Kiam Hector 14-jara estis entuziasmiĝinta en Esperanto kune kun Edmond Privat, Ferdinand diris al modelino Jeanne; Edmond estas lia eterna amiko. Nenio povas fuŝi tiun amikecon. Hector desegni kapablas, talento videblas. Sed liaj pasioj kuŝas aliloke. Kiam Hector 19-jara estis plenstrebanta en preparo de internacia Esperanto-kongreso, la patro diris al la filo; Viaaĝe interesis min fraŭlinoj, vi vizitas filozofojn por via kongreso. Uzu miajn penikojn por via afero. Kaj kiam Hector petis helpon pri la kapitalo por Esperanto-revuo, li donis duonon. La revuo "Esperanto" nun daŭras kiel la organo de UEA.

Valentine; Fascinite de ŝia nuko Hodler enamiĝis, desegnis ŝin. Ŝiaj portretoj fariĝis dokumentoj pri amo. 60-jara li re-patriĝis.

Jeanne; Ekde 1901 ŝi pozis por Hodler dum 15 jaroj. 3 jarojn poste ŝi foriris kolerege kontraŭ Hodler. Sed ŝi denove fariĝis modelino de Hodler, kvankam ŝi estis edziniĝinta al franca dirigento Andreo.

Hodler sukcesis en la konkurso por la motivoj de svisaj monbiletoj. La motivo de 50-svisfranka estis portreto de Jeanne, kaj sur ĝia dorsflanko estis pentraĵo "Arbohakisto".

Andreo mortis. Jeanne edziniĝis al Meho, mostardevena islamano. Li fariĝis registara oficisto de Kroata-Bosnia-Hercegovino. Post lia emeritiĝo la geedzoj transloĝiĝis al Mostar. En ilia ĉefĉambro pendis portreto de Hodler kiun Hodler donacis al Jeanne. Kaj post la morto de Jeanne kaj Meho, la nevino de Meho trovis en granda ŝranko multegajn desegnaĵojn, pentraĵojn, multajn nefinitajn. Specialsito de Hodler identigis ilin aŭtentikaj de Hodler. Iu fakulo opiniis, ke kelkaj ŝajnas de Jeanne, aŭ de Hector.

Tiele pli ol 200 verkoj de Hodler estas ĉe Artista Galerio de Bosnio-Hercegovino, Sarajevo, kaj portreto de Hodler pendis en Mostar.



Pri la 104-a Japana Esperanto-Kongreso

Dato: la 3a, 4a, 5a de novembro 2017.

Kongresejo: en la mezo de la urbo.

Kotizo de homoj el eksterlando: 2 000 enoj. Por aliĝo, turnu vin al Japana Esperanto-Instituto (rete: jek2017@jei.or.jp, reteje: <http://www.jei.or.jp/evento/2017/jek/>) Pri la urbo Jokohamo, turnu vin al ni, je info@esperanto.yokohama.



Jokohamo 2017

La 104-a Japana Esperanto-Kongreso

Tiel Okazis

*mar. 18 [Kanagawa Kenmin Sentaa]

En la Hama-Ronda Vespero marta, ni revuis la kolektadon de la "Unuaj Lernolibroj". S-ro Fuse klarigis pri la karakterizaj lernolibroj, kaj s-ino Doi pri la kolektado.

(Pri tio ni planas poste prezenti, kune kun foto de la lernolibroj).

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj

(ĝenerale en Kanagaŭa Kenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso Eseoj por legi "Tamen ĝi moviĝas!"

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj", 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

(3) Daŭriga kurso, gvidata de Fuse Kentarou

*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Posttagmeza klaso por legi "La Zamenhof-Strato" gvidata de Doi Ĉieko

(2) Antaŭtagmeza klaso Belĉielo por legi "La Orpantalono", gvidata de Doi Ĉieko

*Krome neregule du fojojn monate, la Klaso Belflora por legi libron "La Orpantalono"